

Nora Moerbeek-Bartels (1930 - 1998)

Nora Bartels, poste Nora Reinders-Bartels kaj fine Nora Moerbeek-Bartels, naskiĝis 21 aŭg. 1930 el gepatroj blindaj. La gepatrojn fascinis la teatraĵo de Ibsen Nora, laŭ kiu ili baptis sian filinon. Jam en sia dua vivojaro ŝi perdis ambaŭ okulojn pro tumoroj. Postrestis viva intereso pri koloroj. Kun la du fratoj kaj ŝi la gepatroj evidente jam parolis almenaŭ kelkajn vortojn en Esperanto, ĉar ŝi memoris, ke enlitiĝe ili diris: “Bonan nokton, patro kaj patrino.” La patro ne longe vivis kaj la posta juda amiko de la patrino ne postvivis la militon, fakte jam tri-jara Nora eniris blindulejon en Bussum, kun maloftaj kontaktoj de la malriĉa patrino. En la institucio Bartimeus ŝi konatiĝis kun la posta edzo, brila orgenludanto kaj akordionisto Johan Reinders. Ŝi mem lernis pli, interalie stenografion kaj Esperanton, kion Johano ja provis sed vane. Loĝinte en Amsterdamo, ili transloĝiĝis al Beverwijk, kie Johan pli enspezis kiel policeja telefonisto. Nora venigis tien ankaŭ la surdan-blindan patrinon. Ilia sola filo, malforte vidanta Helmut, kiu studis nederlandistikon, pro la patrinflanka malsano mortis jam 24-jara. Johano ne povis ŝin konsoli, savis ŝin Jacques Tuinder kaj Paul van den Berg (fondinto de la surd-blindula organizaĵo VAG, krome prezidanto de Nosobe), instigante ŝin instrui ilin – laŭ ŝi pli klerajn – pri Esperanto.

Kun Paul ŝi sekvis en la Universitato de Amsterdamo la lekcionojn de licenciito Adriana Middelkoop, Nederlande fama pro sia Esperanta vortaro. Lernema ŝi estis. La lingvo-praktikan, mezan kaj superan diplomojn ŝi perdidigis en Nederlando, la UEA-ILEI-mezan en Hannabanilla 1990. Tiujn sciojn ŝi ekspluatis krom la profesia stenografio.

Por NGGE (Esperanto-instruista fakgrupo) ŝi protokolisis, mem varbadis kursanojn kaj instruis: la pli junaj estraranoj de Nosobe (vidhandikapitaj esperantistoj) kaj la urbestredzino de la apuda Heemskerk, poste longtempa estraranino de Esperanto Nederland Joke Hoobroeckx lernis la lingvon ĉe Nora. Ŝia maljuna lernantino Wil Annes, mem eksinstruisto al malfacile lernantaj infanoj, ebligis al Nora eldoni libron kaj partopreni kongresojn.

Tra Esperanto ŝi instruis la nederlandan al rifuĝinta lernejestrino el Irano.

Iom longe ŝi kunestris la Ekzamenan Komitaton, ĝis oni decidis aboli la tradukon el la nederlanda. Por Nora per tio degradiĝis la ekzamenoj.



Por FEN, la tiama kupola federacio de nederlandaj E-organizaĵoj, ŝi reprezentis Nosobe kaj por ĝia organo Fenomeno (nun Fenikso) krom fojaj artikoloj ŝi kunredaktis la Lingvan Rubrikon dum pluraj jaroj.

Por Beverwijk kaj Heemskerk ŝi kun Ton Verwoerd gvidis “Stelrondo”, interalie invitante pekinan radioparolistinon Rosa por varba kunveno en loka kulturcentro. Eĉ tri ĉinajn samideanojn, unu blindan, ŝi invitis por la roterdama UK kaj sekva IKBE en Vught, gastigante du el ili iom longe hejme. Laŭ ŝia propono Heemskerk inaŭguris strateton kun maljunulejo “Zamenhof” (nederlande-misprononce “Kune-Korto”), Zamenhoftage 1887, kaj precize post unu jaro ŝi edizgis Rob Moerbeek ankaŭ en Heemskerk, post surpriza infanĥora kantado laŭ instruoj de Ton Verwoerd kaj kun postsolenaĵa alparolo de Joke Hoobroeckx en Esperanto. La ĉeestantoj urbodome kantis la Esperanto-himnon.

Por Nosobe mem ŝi laboradis, okaze de la centjara jubileo kun la membraro organizante varbkampanjon, kiu kreskigis la societon ĝis pli ol cento da membroj. En la organo, daŭre sub Jaap Wieringa, nun jam 82-jara! – ŝi

interalie raportadis pri kongresoj, plej entuziasme pri la grandioza pekina en 1986. Sub ĝia impreso ŝi kunfondis Amikan Rondon por Ĉinaj Esperantistoj ARĈE. Ŝi iniciatis kursosemajnfinojn (ekde 1979 en Wemeldingen), kunorganizis du Internaciajn Kongresojn de Blindaj Esperantistoj IKBE (la unuan en Breda, 1981; la duan kiel prezidanto de LKK en Vught 1988). Por nelegantoj de brajlo ŝi voĉlegis “La Kontakto” kaj ankaŭ poste kunorganizis la surkasedigadon de “Esperanto” kaj “Monato”, respektive helpe de Esperanto-kluboj en Groningen kaj Eindhoven.

Ankaŭ por la internacia LIBE ŝi dediĉis siajn fortojn: unue kiel kasisto, poste kiel sekretario kaj redaktoro de “Esperanta Ligilo” (EL). Krome ŝi vizitis bibliotekojn en Nederlando kaj Manĉestro por kompili Katalogojn de brajlaj kaj son-libroj. El la domo de la antaŭa redaktoro Raymond Gonin en Villeurbanne, Francio, ŝi helpis prepari la transportigon de la tuta EL-kolekto al Internacia E-Muzeo en Vieno. Sed ŝi ankaŭ enkondukis la UEA/ILEI-ekzamenojn en IKBE (ekde 1995) kaj poste en la internacian kongreson de AEH (handikapuloj). Tion agnoskis ILEI kaj AEH per honoraj membrecoj.

Pro siaj sekretariaj laborejoj – kaj helpo al individuaj pli malriĉaj samsortanoj, interalie en orienta Eŭropo, ŝi distingiĝis per la Kavalireco en la Ordeno de Oranje Nassau, reĝintage 1996. Bona okazo por varbado dank’ al la publikajoj. Samele servis la transdono de siaj tradukoj: Al Mies Bouhuys la E-version de “Anne Frank is niet van Gisteren” (Anne Frank ne estas de hieraŭ), pro kiu ŝi meritis la premion de la Libro de la Jaro 1988 kun oficiala transdono en Brajtono.

Jam en 1987 ŝi gajnis la unuan premion en tradukkonkurso de FEN per fragmento el “Sur kampo granita” de István Nemere, kies tuton ŝi povis publikigi en 1997, kiam aperis ankaŭ ŝia esperantigo de la preskaŭ kompletigita “Taglibro” de Anne Frank. Ĝin eldonis Libroteko Tokio, kies direktorinon Szyozi Keiko ni ekkonis per s-ano Tsukasa Kobayashi, kiu antaŭe petis permeson presi fragmenton en sia 24-hora E-kurso por japanoj.

Honoroj do ne mankis, sed ŝi mem kun kolego estrarano de Nosobe Jan Verheule, jam pli longe kavaliro en la sama ordeno, perpledis reĝinan distingon por la delonga kasisto-redaktoro de Nosobe, Jaap Wieringa.

Komprenoble ŝi vikle partoprenis ankaŭ la Esperanto-lekciojn de la posta edzo Rob Moerbeek, kuntradukante “Ne tiel, sed ĉi tiel. Por agrablaj kontaktoj kun nevidantoj”, kaj similajn broŝuretojn pri move handikapitoj kaj surd(blind)uloj. Falo en la fino de decembro 1997 haltigis ŝian nederlandigon de “La danĝera lingvo” de Ulrich Lins.

Por UEA ŝi estis interalie Dumviva Membro kaj Delegito en Beverwijk, Nederlando, kaj Fakdelegito pri blindulaj aferoj kaj Esperanto-instruado.

En Internaciaj kongresoj ŝi partoprenis post la morto de Helmut: en Hamburgo (1974) ŝi sentis sin izolita – tial ni kutimis direkti nin al solaj komencantoj por ilin paroligi, sed ekde Lucerno 1979 plivigliĝis la kontaktoj. 16 UK-jn, 14 IKBE-jn kaj 4 ILEI-konferencojn ni ambaŭ vizitis. Ĉar ŝi pro Paul van den Berg ekkonis privatan kantinstruiston René Van der Sluis, ŝi ne nur kunkantis kun la loka “Animo”, sed komencis kuraĝe solkanti en IKBE, foje ILEI-konferenco. Ankaŭ plane kvarmane ni ludis aŭ ŝi kantis kongreslandajn melodiojn ekde Onnela (1995): ĉiam la samsortanoj volonte sendis la muzikon, kiun ŝi do lernadis partete post partete el kasedoj. Unu el la kromakcidentoj de ŝia vivo – apud la hereda malsano, kiu forpasis ĉiujn: la patrinon, la filon, la du fratojn, kaj la vida handikapo – falo de ŝtuparo senigis ŝin de unu ringfingro – devigis ŝin relerni ĉiujn pianajojn, sed “leone” ŝi persistis kaj reatingis nivelon indan.

Miraklo okazis en la Pekina UK: sonis averta gongobato, kaj ni - malfrue pro busa poroblema - trovis lokon nur tute supre. Nia vojaĝgvidanto min vokis aparte kaj mi hazarde sidigis Noran apud iu ĉino. Kio do okazis? Mi ricevis la perditajn flugbiletojn kaj Nora najbaris sian solan ĉinan korespondanton, la famegan Huan Nai, adaptanton de brajlo al la ĉina!

En la Praga UK 1996 mankis pretulo por prezidi la nova nefum-fakon: Nora lasis sin persvadi, se la edzo sekretarios. Unu kaj duonan jarojn ŝi prezidis TADEN. Kaj dank’ al ŝia instruado troviĝis nova prezidanto, nun ankaŭ prezidanto de Nosobe: Jan Bemelmans. Ŝiajn sekretariecon kaj voĉlegadon de LK transprenis alia lerninto, Elise Lauwen. Nora forpasis post 82-taga litkuŝado, la 17-an de marto 1998.

En funebra renkontiĝo oni kolektis mondonacojn por la agado de Jacques Tuinder (“Evidente” de 1966 helpas al la plej malriĉaj vidhandikapitoj), la kontraŭkancera Fonduso fondita de reĝino Wilhelmina kaj “Manifesto 2000” de UEA, 22 marto 1998. Kaj poste alvenis ankoraŭ pli ol 300 kondolencoj, kaj unu salono en la blindula kongreso apud Bordoza nomiĝis Nora.

En 2009 Nosobe rememoris sian 80-jariĝon. Kasedoj kun vortoj kaj precipe kantado de Nora havis emocian efikon nevortigeblan. Tiaj homoj inspiras per sia entuziasmo.